# *Komenci?as en Kubo agotagoj kontra? homofobio kaj transfobio*

**Agotagoj kontra? homofobio kaj transfobio ?is la  31-a de majo**

Havano, maj 4 (RHK) Kubo celebras ekde hodia? kaj ?is la 30-a de majo, la 14-a eldono de la Agotagoj kontra? Homofobio kaj Transfobio, sub la slogano ?iuj rajtoj por ?iuj personoj.

La? komuniko de la Centro Nacia pri Seksa Eduko (Cenesex), pro la epidemiologia situacio de  la pandemio de Kovim-19, oni anta?vidis programon por akademia dialogo, socia aktivismo kaj artaj iniciatoj tra la virtualaj spacoj.

La celo estas videbligi kaj batali kontra? ?iaspecan diskriminacion pro seksa orienti?o kaj genra identeco, sciigis la institucio.

Inter la aran?oj programitaj, okazos forumo-debato la 6-an de majo ?e la junulara ?urnalo Juventud Rebelde kies temo estos ´Malkonstruante mitojn ?irka? la familioj kaj paroj samseksamaj´; kaj alia, la 12-an de majo, ?e la portalo Cubadebate, fokusita en la ´Konstitucio kaj rajtoj seksaj en Kubo: avancoj kaj ?efaj defioj´.

Aliflanke, la 15-an de majo okazos paneldebato ´Familioj diversaj: vivhistorioj ne hegemonaj´, kaj du tagojn poste, okazos dialogo pri la Nacia Programo por anta?enigo de la virinoj kaj ?ancoj por fronti la homofobion kaj transfobion.

Religiaj fundamentismoj kaj genro-identecoj ne heteronormaj estas aliaj temoj de la alvoko.

La? la komuniko de Cenesex, la agotagoj estas parto de la kleriga procezo, kiu devas akompani la anta?vidatajn transformojn en la jura ordo de la kariba insulo.

La nuna eldono de tiuj ?i agotagoj okazas en aparta scenejo pro la promulgo, en 2019, de la nuna konstitucia teksto, kiu protektas la garantiojn de la personoj LGTBI per la reguligo de la principo de egaleco kaj ne diskriminacio.

La evento organizatas ekde la jaro 2008 flanke de Cenesex kun la celo kontribui al la integrala eduko de sekseco kaj rekono de la rajtoj de ?iuj personoj sendistinge, kiel ekzerco de socia justico kaj egaleco.

fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/256203-komencigas-en-kubo-agotagoj-kontrau-homofobio-kaj-transfobio

Radio Habana Cuba